

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2022:1

Ni kongresos surŝipe denove!
Tria Skandinava Kongreso 27–30 majo



2018 © Sverre Andreas Rud

M/S Crown Seaways. Foto © Sverre Andreas Rud 2018 från faktaomfartyg.se.

ESPERANTO NORDIO

Om inte pandemin kommer med nya överraskningar blir det en ny skandinavisk kongress under Kristi himmelfärdshelgen den 27–30 maj.

Läs mer på sidan 3 och på www.esperantonordio.org

Glöm inte att anmäla dig till SEF:s årsmöte 26/3 kl. 13:00 via Zoom!
Läs mer på sidan 3.

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2022 • 110-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Olof Pettersson och Keiko Snarberg

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08 34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen:

laespero@esperantoforbundet.se

Ansvarig utgivare: Bengt Olof Åradsson

Utformning: Omnibus Typografi

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration (endast tidning): 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: svenska@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperantoforbundet.se

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Swish: 123 523 41 66, Esperantoförbundet

Payson & PayPal: pago@esperantoforbundet.se

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift fr.o.m 2022:

Medlemsavgift för 12 månader: 180 kr. I avgiften ingår medlemsorganet LA ESPERO, som skickas i pdf-format via epost till registrerad epostadress.

Avgift med postsänd papperstidning: 230 kr.

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 070 620 08 46

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

Plusgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto-gbg.org/eldona/

E-post: eldona@esperantosverige.se

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården

680 96 Lesjöfors

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: info@esperantogarden.se

Telefon: 070 767 54 55

Manus till La Espero

sänds till La Espero, c/o

Svenska Esperantoförbundet, Box 2276,

103 17 Stockholm; Tel 08 34 08 00

E-post: laespero@esperantoforbundet.se

| | Stoppdatum | Utkommer senast |
|------|------------|-----------------|
| Nr 1 | 1 februari | 1 mars |
| Nr 2 | 15 maj | 5 juni |
| Nr 3 | 20 augusti | 15 september |
| Nr 4 | 1 november | 1 december |

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Nytt år – nya tag. Som ni kanske kommer ihåg, beslöt vi på förra årsmötet att i fortsättningen ha våra årsmöten redan i mars för att göra det lättare för styrelsen att planera och genomföra sitt arbete under året. Ni glömmer väl inte att gå in i **Kalendaro** på *esperantoforbundet.se* och anmäla er till årsmötet. Där ska ni också kunna hämta årsmöteshandlingarna när de är klara.

★

Från och med i år ska alla medlemmar, även klubbmedlemmar, skicka in sin avgift direkt till SEF. Alla ska ha fått meddelande om detta i samband med utskicket av nummer 4 av LA ESPERO i december. De som inte har betalt inom en månad efter medlemsperiodens utgång får en påminnelse. Vi hoppas förstås att alla väljer att fortsätta sitt medlemskap i Svenska Esperantoförbundet.

★

Ett par av våra medlemmar har kommit med förslaget att skapa en "framtidsgrupp" som ska samla in fakta om de nuvarande esperantoorganisationerna i Sverige. Dessa fakta ska vara underlag för analys och diskussioner om den framtida inriktningen av esperantoarbetet i Sverige. SEF-styrelsen tackar för initiativet och ställer sig helhjärtat bakom detsamma.

★

Som vi nämnde i förra numret av LA ESPERO kommer den uppskjutna Tria Skandinava Kongreso att bli av i år. Om den kan ni läsa på annan plats här i tidningen. Upplysningar om evenemanget kommer fortlöpande att läggas in på hemsidan *esperantonordio.org/kongreso* allteftersom de blir klara. Passa på att delta i en trevlig samvaro med esperantovänner när den möjligheten nu förhoppningsvis kommer att kunna realiseras.

Nya redaktörer

Från och med i år, 2022, tar Bengt Olof Åradsson ett steg tillbaka från redaktörsposten efter lång och trogen tjänst. I stället kommer en redaktionskommitté som i dagsläget består av Olof Pettersson och Keiko Snarberg gradvis att ta över ansvaret för innehållet i LA ESPERO.

Olof har varit medredaktör i många år och Keiko hörsammade efterlysningen av nya intresserade i ett tidigare nummer, men fler är så klart välkomna att bidra i redaktionsarbetet!

Styrelsen

Bonvenon al la Tria Skandinava Kongreso de la 27-a ĝis la 30-a de majo

Ni estas feliĉaj povi anonci ke la Tria Skandinava Kongreso okazos ĉi-jare. Laŭ la origina ritmo ĝi devus okazi pasintan jaron, sed pro la kronviruso ni ŝovis la eventon. Ni nun scias ke la viruso cedos kiam la temperaturoj altiĝos, kaj nia dana asocio DEA kunvenis fizike por nia jarkunveno pasintjare komence de junio. Pro tiaj spertoj ni opinias ke eblas realigi la renkontiĝon ĉi-jare.

La danoj respondecas ĉi-jare

Dum la pasinta kongreso en 2018 Svedio bone gvidis, kaj ĉi-jare Danio estas gastiganto, kaj ni kompreneble esperas ke Norvegio respondecos en 2025.

Ni esperantistoj estas homoj kiuj havas la deziron lingve kunigi la mondon, kaj nia skandinava kunlaboro estas eta ekzemplo pri tio. Niaj tri landoj havas lingvojn kiuj havas fratan proksimecon. Ni komprenas unu la alian, sed malgraŭ tio ni invitas vin al kunesto kaj provi ĉu niaj esperantaj flugiloj daŭre

taŭgas por flugi. Estas pri ĉiuj kapabloj tiel ke kiam ni uzas ilin, ili plifortiĝas kaj nia plezuro uzi ilin kreskas. Iu saĝa homo iam diris ke ne donas la ni la plej grandan plezuron la atingo de niaj celoj, sed la vojo tien. Dum longa tempo ne estis fizikaj kongresoj, kaj nun vi havas ŝancon denove trovi la fruktodonan esperantan medion.

ESPERANTO NORDIO

Multaj homoj restis izolitaj dum la viruso, kaj laŭ la informo de la dana registaro la viruso cedas kaj verŝajne iom post iom foriros.

Kontribuu al la programo!

Mi esperas ke mi sukcesis instigi vin partopreni la Trian Skandinavan Kongreson kaj tiel fortigian kunlaboron. Kiel vi povas vidi en la provizora programo, ni bezonas iom da helpo de vi. Por havi fluan kaj interesan programon, mankas du prelegantoj el

ciu lando, kaj kuraĝaj homoj kiuj volus distri nin pere de mallongaj distraĵoj al la komuna vespero. Jam estas kelkaj kiuj ofertis ion. Povas esti kanto, skeĉo, laŭlegado aŭ rakonto de amuza historio. Se vi havas kanton, sendu la notojn al mi kaj dana gitaristo kiu partoprenos povus akompani nin.

Minimume tridek kvin

La pasintan Skandinavan Kongreson partoprenis 45 homoj. Ni decidis fari minimuman limon de partoprenantoj al 35. Do, ni esperas ke estas vasta intereso por la la projekto.

Aliĝilo kaj pli da informo

Vi trovos pli da informoj pri la kongreso en esperantonordio.org/kongreso/.

Amike
Peter Wraae
Prezidanto de
Dana Esperanto-Asocio

kongreso@esperantonordio.org

Gemensam skandinavisk kongress ombord på M/S Crown Seaways mellan Köpenhamn och Oslo.

Glöm inte

att anmäla dig till SEF:s årsmöte

den 26 mars via Zoom

Anmälningen sker i **Kalendaro** på vår hemsida esperantoforbundet.se. Bläddra fram till rätt månad (mars) på kalenderbladet med pilen uppe till höger och klicka på rätt datum (26). Använd sedan anmälningsknappen och fyll i dina uppgifter i formuläret som dyker upp.

Håll gärna utkik på samma ställe i **Kalendaro** efter en knapp eller länk, där du kan ladda ner årsberättelsen. Den ska finnas tillgänglig en månad innan årsmötet. Om du vill ha handlingarna skickade på papper, ring till sekreterare Ann-Louise, telefon 073 617 01 23.

Inför mötet får du en länk tillsänd via mail.

Svarstiderna på sidan kan vara lite långa ibland, men tappa inte tålamodet. Välkommen!

Styrelsen

Se även
valberedningens
förslag på sidan 6!

Svenska esperantorörelsen och framtiden

Tider förändras, förutsättningar förändras. Även vi esperantister måste kunna förändras. Av tidigare generationer har vi tagit över organisationer, ekonomiska medel, lokaler, bibliotek mm. Det ligger på oss att lämna över så mycket som möjligt av vår kultur till kommande generation esperantister.

Tiden är inne att planera hur vår framtida organisation ska se ut. Hur ska vi rädda mest möjligt av våra bibliotek? Hur många lokaler klarar vi av att finansiera och ha tillsyn över? Hur förenklar vi våra rutiner i syfte att underlätta och förbättra vårt arbete för esperanto?

Den ideella delen av rörelsen behöver samverka mycket närmare än vad vi gör idag. Det handlar om förbundet, klubbarna och ILEI-sektionen. För att nå resultat måste vi alla ta ansvar för hela den svenska esperantorörelsen. Det fungerar inte längre att bara bry sig om den organisation man är medlem i eller blivit vald till någon uppgift i. Det fungerar inte heller att bara bry sig om den löpande verksamheten. Vi måste höja blicken och planera för de kommande 5, 10, 15, 20 åren. Gör vi inte det kommer verkligheten att bestämma vår framtid.

Samtal har förts med SEF:s styrelse som står bakom bild-

andet av en "framtdsgrupp". I denna ingår Sten Svenonius och Andreas Nordström och vår uppgift blir att kartlägga de nuvarande organisationerna och analysera olika möjligheter att stärka rörelsen. Berörda styrelser ska kunna fatta kloka beslut för ovan ställda frågor baserat på faktaunderlag. Vi kommer att behöva prata med dem som bäst känner sin organisation och om er åsikt och planer för framtiden.

Tillsammans kan vi lösa våra problem.

Enade vi stå, söndrade vi falla.

*Sten Svenonius
Andreas Nordström*

La Espero skannas

Arbetet med att skanna LA ESPERO har påbörjats och i skrivande stund har vi de senaste 50 åren i elektronisk form, dvs läsbara i dator.

Några nummer av tidningen från 2000-talet saknas. Tillhör du dem som sparar på gamla

tidningar och kan tänka dig att avstå ett par nummer till mig? Detsamma gäller om du sparat utskickade LA ESPERO i elektronisk form från tiden före 2012. Den formen blir alltid lite snyggare än den av mig skannade varianten.

I gengäld skickar jag gärna gamla LA ESPERO i elektronisk form om någon vill läsa om något i gången tid. Skriv till fidinda@outlook.com.

Sten Svenonius

JARKUNVENE

Som en nyhet inför förra årets årsmöte presenterade vi valberedningens förslag i årsmöteshandlingarna. Så även i

år. Men då alla kanske inte gör sig omaket att be om handlingarna i förväg, presenteras valberedningens förslag av kandidater till styrelsen även här i LA ESPERO.

Mestadels omval

Tanken med att presentera att det redan finns förslag på kandidater, om än som vanligt mestadels omval av de nu sittande medlemmarna, är att ingen ska avstå från att delta på årsmötet av oro för att bli vald till något. Sedan går det förstås att

föreslå andra kandidater på själva mötet om någon känner sig manad.

Enstaka vakanser

Posterna revisorssuppleant samt ytterligare en medlem till nästa års valberedning vore förstås önskvärdt och kan vara en avgränsad uppgift för någon som vill engagera sig, men till de ordinarie posterna finns som sagt redan förslag. Har du egna förslag – kontakta gärna valberedningen@esperantoforbundet.se

Styrelsen

Ordförande: Puff Östling (omval, 1 år)
Vice ordförande: Olof Pettersson (1 år kvar)
Kassör: Lotta Lauritz (1 år kvar)
Sekreterare: Ann-Louise Åkerlund (1 år kvar)
Ledamot: Martin Strid (omval, 2 år)
Suppleant: Stella Lindblom (omval 2 år)
Suppleant: Ingegerd Granat (1 år kvar)

Revisorer: Per-Olov Johansson, Ulrika Hoppe
Revisorssuppleant: (vakant)

Valberedning: Andreas Nordström (sammankallande), Sten Svenonius; (vakant)

Klubben i Sundsvall blir grupp

Esperantoföreningen i Sundsvall genom dess styrelse och medlemmar har beslutat att föreningen från och med årsskiftet 2022 övergår till att bli en grupp som vi kallar *Amika Rondo*.

Därmed går de från SEF försägningsmedlemsavgifterna direkt

till SEF och tidningen eller dess nätversion skickas till medlemmarna. SEF får vid behov sända påminnelser till tidigare medlemmar.

Vi i sundsvallsgruppen kommer fortsatt att hålla kontakten och ha träffar samt när det finns möjligheter kurser i Esperanto.

De lokala träffarna kommer vi själva att bekosta. Med hopp om att 2022 blir ett normalt år med fria möjligheter att träffas mer än vad som varit möjligt 2021, då vi bara haft en träff utomhus vid vår sommarstuga men med många deltagare.

Ingrid Näsholm & Åke Näsholm

Bidrag till professur i Amsterdam

I förra numret av LA ESPERO informerade vi om professorstjänsten i Esperanto och interlingvistik vid Amsterdams universitet, som innehåller av Federico Gobbo, och att vi beslutat att stödja denna under fem år. Vi inbjöd också våra medlemmar att vara med och bidra, vilket Kerstin Kristoferson har gjort genom att skicka en större summa till SEF:s konto 2012-3. Vi riktar ett stort tack till Kerstin och vidarebefordrar pengarna till UEA, som samordnar bidragen.

Styrelsen

Vill du också bidra? Sätt in din gåva på något av följande sätt och ange "Katedro" som meddelande:

- pg 2012-3
- Swish 123 523 41 66
- Payson & PayPal: pago@esperantoforbundet.se

Esperanto på allvar

Joel Shemu och hans 8 fosterbarn i Rwanda (som ni har läst om i tidigare nummer under 2021) kämpar på för att bli självförsörjande. De odlar sin egen mat och hoppas på ett överskott att sälja. Med hjälp från esperantisterna i Kamembe har de köpt ett stycke jord, 5 km från staden. Regntiden är nu över dem och vädret är kyligt på 1000 m.ö.h. Men jorden ger dock skörd om tre månader. Nu kan vi, som är bättre lottade, ge ett rejält handtag med pengar och insatsmaterial: skrivböcker för barnen, plastfickor, stearinljus, nål & tråd, lim och snören (!), tröjor. Har du ett munspel till övers?

Ingvar Enghardt

För pengabidrag har Ingvar öppnat ett personligt och separat konto hos SEB, dit bidrag är välkomna, stora som små:

5233-01 595 87 skriv "Joel&8"

För att skicka paket till Joel:

Esp.group, Brinson

B.P. 428, RUSIZI, Rwanda

För att maila direkt till Joel:

shemujoel.estigho@gmail.com

För frågor, kontakta: Ingvar Enghardt, Stockholm, mob. 0762733410

Lär du dig Esperanto?

Har du bokpaketet eller följer du någon nätkurs, såsom *lernu.net* eller *Duolingo*? Vill du öva lite konversation, kunna ställa frågor och få kompletterande undervisning på nivån A1–A2? På Zoom på måndagar kl 19:30–21:00 sysslar vi just med detta!

Alla är välkomna. Både de som lär sig och som kan fungera som ledare. Skriv till esperantoagado@outlook.com.

Du deltar när det passar dig.

Det kostar inget.

Det är roligt att lära sig Esperanto!

Sten Svenonius

Zoom på måndagar kl 19:30–21:00

Hålltider

19:30–20:00

Lätt konversation.

Ställ dina frågor.

20:00–21:00

Genomgång av olika delar i Esperanto


Interesaj informoj pri la iama amatora astronomo Elis Dahlgren (1903–1996)

Elis estis unu el la grandaj profiloj en la regiono de Vikmanshyttan en suda Dalekarlio. Li ankaŭ studis Esperanton uzante la lingvon por akiri konon pri diversaj sciencaj temoj, kiujn li ne studis en lernejoj (eble mankis la mono por tiuj studadoj). Esperanton li eble ankaŭ studis aŭtodidakte.

Per esperanto li havis kontakton kun sciencistoj, kiuj ankaŭ uzis esperanton dum tiu aktuala periodo en la komenco de la pasinta jarcento. Pruvo de tiuj kontaktoj estas la montrado de poŝtkartoj en la “Bruksmuseum” de Vikmanshyttan.

Krom astronomio, Elis interesiĝis pri insektoj. Li kolektis ĉirkaŭ 1900 papiliojn. Pri la flaŭro li kolektis herbariojn.

Elis ankaŭ estis verkisto. Li verkis romanon “En la direkto de



Elis Dahlgren – kaj esperantisto kaj astronomo. Fotis Wim Posthuma.

novaj mondoj” kaj libroj pri lokaj dialektoj. Koncerne la intereson pri astronomio, li per astronomia lorno malkovris novan stelon kiu nomiĝas “nova Dahlgren”.

Sed esperantistoj eble plej interesiĝas vidi la amason de

poŝtkartoj de la tuta mondo senditaj al li kun teksto en Esperanto.

Siri Bartusch malkovris tiun muzeon pro ŝia intereso en astronomio. Ŝi tradukis la tekstojn sveden por ke vizitantoj povu legi la kartojn.

La muzeo montras multe pli ol aĵojn memore al Elis Dahlgren. Ekzemple la kulturen evoluon de la provinco ĉirkaŭ Vikmanshyttan. La plej konata produkto de tiu ferfandejo estis rusto-rezista ŝtalo. La kvalito de tiu ŝtalo estis mondfama kaj inter 1930–1976 dezirata de enterprenoj. Nun la ferfandejo en Vikmanshyttan ne plu produktas ion ajn.

Wim Posthuma

bruksmuseum.se/elis-dahlgren.html

ELIS DAHLGREN-SAMLINGARNA

Samlingarna innehåller bl a:

- Stjärnkikare och karta över den av Elis upptäckta stjärnan, Nova Dahlgren
- Svenska fjärilar, c:a 1 900 st
- Diverse insekter, c:a 2 000 st
- Herbarier, med faktauppgifter, c:a 2 400 st
- Bygdemålsböcker över norn- och norrhyttmålen
- Rymdromanen “Mot nya världar”
- Flera skrifter och klippböcker med kåserier
- Vykort från hela världen skrivna på esperanto

Mer information om träffen i Skövde

Har du kvar LA ESPERO 2021:4? Bra! Tag fram den!

Jag hade en efterlysning där – men endast tre personer har anmält intresse. Kanske såg man inte annonsen, kanske var det ointressant, eller båda delar?

Jag gör ytterligare ett försök, men är intressat inte större så skrinlägger jag idén. Vidare slopar jag mat på kvällen så då kommer priset att ligga på 100–150 kr beroende på lunchpriset.

Den som vill ha vegetariskt/veganskt måste ange detta!

Obs! Det är du som bidrar till gemenskapen och trivseln!

En tänkbar programpunkt kan vara att diskutera esperantorörelsens framtid i Sverige.

Obs! Nytt datum!

Vi träffas lördagen den 11/6 vid 9-tiden och håller på tills andan går ur. Klubblokalen i Skövde finns på adressen Tungatan 4 C (källaren), c:a 15 min gångavstånd från järnvägsstationen.

Senaste anmälningsdag 15/5!
(men informera mig gärna tidigare)

VÄLKOMMEN!

gunnarskovde@hotmail.com

Dag Hammarskjöld – 60 jaroj post la morto (1905–1961)

Dag HAMMARSKJÖLD estis Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj de 1953 ĝis 1961, kiam li mortis en aviadila akcidento, en Afriko. Pasintjare ni memoris lin pro la 60a datreveno de lia morto.

Li naskiĝis la 29an de julio 1905 en Jönköping. Lia patro Hjalmar Hammarskjöld estis prezidanto de kortega tribunalo, poste la ĉefministro de Svedio.

Dag iĝis juristo kaj fakuliĝis kiel ekonomikisto. Li laboris en la registaro de la socialdemokrata Tage Erlander kiel ministro pri fremdaj aferoj, kiam oni lin nomumis al posteno de la ĉefsekretario de UNO, kaj li enoficiĝis je UNO la 10an de aprilo 1953.

En postmilita tempo en la mondo dominis tensio inter la superpotencoj Usono kaj Sovet-Unio. Dum la malvarma milito Hammarskjöld solvis aŭ klopodis solvi pli ol 20 krizojn internaciajn.

Kvankam Dag Hammarskjöld subtenis pacajn agadojn, li volis,

ke UNO havu ankaŭ militan povon. Li fondis la unuan pacsekurigan korpon por UNO dum la krizo ĉe Suez en 1956.

Hammarskjöld estis tre populara ĉe malgrandaj ŝtatoj kaj reelektiĝis en 1957.

Dag Hammarskjöld mortis la nokton inter la 17a kaj 18a de septembro 1961 dum ofica vojaĝo en Afrikon dum la Konga krizo. Post morto li gajnis la Nobel-premion pri paco en 1961.

Dag Hammarskjöld estis ankaŭ poeto kaj estis ano de la Sveda Akademio. Post la morto manuskripto kun la titolo VOJSIGNOJ [VÄGMÄRKEN] estis trovita en lia hejmo. Ĝi estis kolekto de maksimumoj kaj liberaj versoj; kvankam Hammarskjöld mem nomis la kolekton taglibro, aŭ “blanka libro”, “pri miaj intertraktadoj kun mi mem – kaj Dio”. Malgraŭ sia propra priskribo, la tekstoj tute ne temas pri ĉiutagaj eventoj, sed estas malgrandaj notoj pri nenomitaj homoj, pri Dio, moralo kaj vivaj komprenoj.

Inter la maksimumoj rimarkblas:

Neniam permesi la sukceson kaŝi sian malplenon, la penon sian neniecon, la laborvivon sian dezerton, kaj tiel konservi la spronon por atingi plu – la doloron en la animo, kiu nin pelas. Ne reenrigardu. Kaj ne revu pri la estonteco: ĝi ne redonos al vi la pasintecon aŭ kontentigos aliajn songojn pri feliĉo. Via devo kaj via rekompenco – via destino – estas ĈITIE kaj NUN.

La teologiaj aspektoj de la fenomeno Hammarskjöld estis ĉefa temo en la lastatempa intereso. Mats Svegfors en sia libro DAG HAMMARSKJÖLD – LA UNUA MODERNA SVEDO, i.a. klarigas la konceptojn ĉirkaŭ mezepoka germana religia mistikismo, kiu estis grava fonto de inspiro por Hammarskjöld. La traduko fare de Hammarskjöld de Martin Buber estas alia signo de la sama karakteraj trajtoj.

Bengt Olof ÅRADSSON

Vortaro: pretas I–J, K–O, kaj R–Z

Tri pliaj literoj, I, J, O, estas kontrolitaj kaj enmetitaj en la test-version de la esperanto-sveda vortaro, kiun Roland Lindblom (1931–2016) ellaboris dum preskaŭ dudek jaroj kune kun tiama laborgrupo.

Martin Häggström, kiu kunordigas la kontroladon, informas en la interreta paĝaro de la diskutejo, ke nun la test-versio ampleksas literojn I–J, K–O kaj R–Z el la esperanto-alfabeto.

Martin ankaŭ aldonis la literojn Q, W, X, Y, kiuj ne estas uzataj en esperanto.

El la 2 000 paĝoj de la papera manuskripto de Roland, ĉiuj estas enskribitaj en komputilon. Tiu laboro de enskribo estas farita de volontula laborgrupo je deko da grupanoj, kiuj laboras ekde la komenco de la jaro 2017. Restas laboro de finkontrolado pri literoj A–Ĥ, Ĵ kaj pri litero P.

La kontrolado temas nur parte pri kontrolo de ĝusta literumo. Martin komentas: En la kontrolada laboro oni komparas kun fidindaj vortaroj kiel PIV

kaj ReVo, sed ankaŭ kun artikoloj en Vikipedio, kaj foje, per helpo de la programo Textaro (red: esploru www.tekstaro.com), oni kontrolas kiel magazinoj kaj libroj uzas la vortojn. Oni ankaŭ aldonas vortojn, kiuj ne estas en la manuskripto, kaj enmetas referencojn al similaj vortoj.

Martin Häggström skribas en la publike legebla diskutejo, ke se iu trovas eraron aŭ aliajn ŝanĝojn, oni kontaktu unuavice Martin Häggström je martin.bonder@gmail.com, aŭ Bengt Hedlund je bengthedlund@hotmail.com.

La interreta test-paĝaro estas je adreso <http://ordboken.esperanto.se/test/soktest.html>

Pri la estonteco, kiam ĉio estos finkontrolita, okupiĝos Leif Nordenstorm en la Eldona Societo Esperanto. Li sekvas la kontrolan laboron, kaj planas ke necesos kontakti kun profesia eldonisto de vortaroj pri maniero de publikigo elektronike kaj papere.

Ulla Luin

I–J

K–O

R–Z

Junula renkontiĝo en Gotenburgo

Okaze de la novjaro, ok gejunuloj kuniĝis en Gotenburgo. Oni povas nomi ĝin la trian junulan skandinavan renkontiĝon ekde la Skandinava kongreso en 2018. Ĝi multsence similis al la renkontiĝo en Malmö en 2019 (vidu La Espero 2019:2). Ni loĝis en junulargastigejo, ludis plurajn tabloludojn kaj spontanee esploris la urbon. Kelkaj el ni partoprenis kvar tagojn, aliaj parton de tiu tempo.

La ideo de denove renkontiĝi en Svedio ekestis dum KKPS en Ry en Danio fine de novembro. KKPS estis mezgranda renkontiĝo kun partoprenantoj el pluraj eŭropaj landoj, sed la skandinava junuloj tie parolis pri kunlabori por aktivigi niajn junularojn kaj memoris la sukcesan renkontiĝeton en Malmö. Kiam la granda novjara renkontiĝo JES en Germanio nuliĝis, ni decidis fari lokan JESeron en Gotenburgo. La renkontiĝo daŭris inter la 29a de decembro kaj la 2a de januaro. El Danio venis Tobias Nowak, Svend Nielsen, Signe Capien kaj René Nielsen. Svedion reprezentis mi, Ingrid Antonia Berglund, Rickard Vesterberg kaj Latiif al Sharif. Ankaŭ partoprenis Frank van Hertrooij el Nederlando. Du pliaj personoj intencis veni sed bedaŭrinde malsaniĝis.

Unu el la tagoj ni prenis la

pramon al la fama insularo ĉe la urbo. Ni parolis kun kelkaj lokanoj kiuj rakontis pri la insula vivo kaj ili scivolis pri la lingvo kiun nia grupo parolis. Ĉarma restoracio en malnova ligna domo servis kaj lokan fiŝaĵon kaj veganan supon, pri kio ni estis tre kontentaj. Dum naturpromeno sur insulo, rapide malheliĝis kaj ni preskaŭ perdiĝis! Feliĉe ni fine sukcesis trovi la pramhaltejon.

La aliajn tagojn ni vizitis du muzeojn: Universeum kaj Naturhistoriska museet. Tie ni vidis multajn kuriozajn bestojn, eĉ ŝarkojn kaj bradipojn. La gotenbarga klubo invitis nin al sia biblioteko en Stannum kiun ni volonte vizitis. Ni ankaŭ kompreneble devis vidi Esperantoplatsen.

Je la silvestra nokto ni festetis en drinkejo. Poste ni ludis bilardon kaj trinkis teon en la gastigejo kun kelkaj aliaj gastoj. Estis gaja etoso kaj ni restis vekaj preskaŭ ĝis la mateno.

La babilado okazis senprobleme kaj glate tute en Esperanto, kvankam ni ofte parolis pri diferencoj inter la sveda kaj dana lingvoj. Ni ankaŭ parolis pri niaj

ŝatokupoj, komunaj amikoj kaj opinioj pri interalie genraj roloj. Alia temo estis familiaj tradicioj rilate al manĝoj: ĉu oni prenas la manĝon ĉe la tablo aŭ ĉe la fornelo, kaj ĉu oni atendu pri ekmanĝi ĝis ĉiu havas ion sur sia telero? La danoj ankaŭ aĉetis kelkajn tipe svedajn produktojn: Julmust, krispan panon kaj lentajn ĉipsojn.

Mi multe ĝuis la renkontiĝon kaj ĝojas ke la kontakto pluvivas. Estus tre agrable se ankaŭ kelkaj norvegaj kaj finnaj junuloj aliĝus al nia komunumo. Ni vidu kio okazos en la venontaj jaroj. Ĝis la sekva renkontiĝo, pri kiu nenio ankoraŭ estas decidita, ni restos en kontakto per la aplikajo *Telegram*, kie estas pluraj viglaj Esperanto-grupoj.

Ingrid Antonia Berglund



Grupa memfoto de la partoprenantoj.

FORPASO



Britta en 2015.
Fotis Bengt Olof
Åradsson

Britta Rehm 1930–2021

Duonjaron post festo de sia 90-a datreveno Britta forpasis en la maljunula hejmo, kie ŝi pasigis sian lastan tempon.

Britta estis vojaĝema kaj post 1968 ŝi partoprenis kongresojn de KELI kaj UEA multloke en la mondo. Budapeŝto estis ŝia plej favorata vojaĝcelo.

Ŝi estis LKK-membro de la gotenbarga UEA-kongreso en 2003, estrarmembro de la gotenbarga klubo kaj de Esperanto-Gården dum jaroj. Britta ĉiam facile ridis kaj logis aliajn kunridi per amuzaj historietoj, precipe pri la konata gotenbarga ŝercparo Kal kaj Ada.